

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, advok., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-  
direktoro, Kaunas.

N-o 175  
20. 1. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,05 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fk. per lando, kies valuto  
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭpago 0,15 sv. fk.),  
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Dua Interpelacio pri Esperanto en Pola Parlamento (Sejm).

Interpelacio de pola deputito A. Pankratz al la Sinjoro Ministro por Internaj Aferoj pro denova uzo de perforto-rimedo  
kontraŭ esperantistoj flanke de polaj estraroj.

Je mia interpelacio de 19. 6. 23 en aferoj de sekreta observado al frankvilaj ŝtatanoj pro esperantisteco, respondi al mi s-o min. per Pr. 15656, ke „la estraroj nek uzis nek uzas perfortajn rimedojn kontraŭ esp-istoj kaj citas kiel pruvon la neniel malhelpatan agadon de esp. societoj en Warszawa kaj en aliaj urboj; la esp-isto Smura el Starogard estis arestita kaj punita pro sia sinteno kontraŭmilitista; la poste ĉe li farita revizo okazis pro komunista agado.“ — Al ĉio ĉi tio mi nun devas deklari, ke la respondo de s-o min. al mia unua interpelacio ne konformiĝas al la faktoj. Se la estraroj, kiel tion mencias s-o min., ne uzas perfortajn rimedojn kontraŭ esp-istoj, tio estas tre ĝojiga. Ĉar nekompreneble estus, se estraroj — la legogardantoj — mem rompus la leĝojn pri la rajtoj je kunvenoj kaj libera opini-esprimo parola kaj skriba.

Tamen la multnombro, antaŭ la esplorjuĝiston en plej diversaj regionoj de la Pola Respubliko vokitaj mondlingvaj pruvaj alioj, eĉ laŭ ĉi-lasta, ke la ordono fiurilata povas nur veni de la registaro mem. Tiel ekz. la 4. ĝis 5. de okt. 1923 okazis nokte revizado pro „kontraŭŝtata agado“ ĉe esp-istoj-membroj de la esp. societo „Laboro“ en Łódź, Piotrków kaj Częstochowa. De la supozita kontraŭŝtata literaturo oni trovis kaj kunprenis diversajn esp. gazetojn, librojn, en Esp. tradukciajn verkojn de la fama rusa filozofo kaj verkisto Tolstoj (samtempe malpermesas la bolsĉevistaj-komunistaj estraroj la disvastigon de Tolstojaj verkoj en Ruslando pro ilia kontraŭ-komunista enhavo — kja paradokso!), fotografiojn de ekskursoj, privatan korespondadon, havanta nenion komunan kun Esp. aŭ kontraŭŝtata agado. — Nenion plu; kaj tio estas la tuta imagita komunismo irovita en Starogard, kie cetere montriĝis simpla denuncio de persono senskulpula, kaj en la aliaj partoj de Polujo, kion la nacia gazetaro siacele trumpetas tra la mondo kiel grandan malkovron de „kontraŭŝtata agado, sekreta konspirado ktp.“, tiel kompromitante tute senkulpaĵajn kaj politike indiferentajn ŝtatanojn kaj sekve kaŭzante al ili ankaŭ ekonomian perdon.

Plue: La 15. 6. 23 s-o min. persone eldiris en intervjuo tre favoran opinionon pri la mondlingvo Esp. kaj ĝia signifo por la rilatoj internaciaj kaj speciale por la diplomatio kaj la policistaro. Laŭ la en la gazeto „Esperanto Triumfanta“ represetita raporto pri tiu intervjuo diris s-o min. jenon:

„Mia oficistaro, speciale la policistaro, ne povas studi multajn lingvojn. Kvankam mi, kiel Min. por Aferoj Internaj, devas antaŭ ĉio atenti la ŝtatan polan lingvon, tamen mi opinias, ke speciale la policistaro, kiu tre ofte persekutas la krimulojn el diversaj ŝtatoj, devas koni lingvon internacian. Krom tio Esp. havas laŭ mia opinio la estontecon kiel komuna lingvo de registaro.“

Tiu ĉi intervjuo okazis inter s-o min. kaj la verkisto dipl. Prof. Kronenberg el Bydgoszcz, kun permeso pri publikigo en esp. gazetaro. Post kelkaj monatoj, la 26. 11. 23 aperis oficistoj de sama s-o min. en la loĝejo de nomita s-o Kronenberg por fari revizion. Post trihora serĉado oni kunprenis 24 presaĵojn, ĉefe esp-ajn kaj kelkajn pollingvajn gazetojn de moral-religia enhavo kiel „Nowe Drogi“ (Łódź) kaj „Polska Odrodzona“ (Kraków), aperantaj laŭleĝe kun estrara permeso.

Konsiderante supre nomitajn okazintaĵojn mi devas denove konstati, ke depost mia unua interpelacio, malgraŭ la certigo de s-o Min. por Aferoj Internaj, oni plue aranĝas reviziojn ĉe esp-istoj kaj uzas kontraŭ ili perfortajn rimedojn, pro kio mi petas s-on min. respondi al sekvanta demando:

Kiacele estas uzataj en ĉiuj partoj de Polujo la kontraŭkonstituciaj perfortaj rimedoj kontraŭ esp-istoj?

Warszawa, la 15. 12. 23.

La Interpelacianto.

Tradukita de Pola Esp. Servo, Bydgoszcz.

### Socia vivo.

#### Socialaj studoj.

De Otto Bonte, Frankfurt a. M.

Efektiva kaŭzo de militoj.

II.

(Fino.)

Pli grandan seniluziigon faras al ni la konkludo de la artikolo, kiu promesis pritrakti la problemon laŭ relativeca vidpunkto. La interregnaj konfliktoj povas esti forigitaj de la esperata superŝtata registaro nur per arbitraciaj decidoj, kaj tiaj kompreneble neniam povas doni absolutan justecon, sed nur relativan. La karaktero de arbitracia juĝo kompare al perforta decido ja estas, ke ĉiu partoprenanto devas iom cedi. Mi nun diras: Tiu karaktero de relativeco apartenas al ĉiu okazado en la mondo. Se io okazas, du fortoj aŭ pli devas esti, kiuj inter si konflikta. Neniam la unu forto sola restos: neniam la alia tuj tute malaperos. La venko ĉiam estos relativa; ankaŭ en milito. La militvenkinto neniam tute neniiĝas la kontraŭulon. Tial oni povas paroli de pli granda aŭ pli malgranda venko. Per la mondilito la fortoj de Germanio ne estas nepre neniiĝitaj. Relativeco estas la esenco de la tutmonda okazado, kaj ne celo, kiun la homo devas aspiri. La vera aplikado de ĉi principo de relativeco al nia problemo estas tiu: Neniu el la menciitaj principoj estas tute netaŭga. La aŭtoro eraras dirante, ke marksismo, anarĥismo, pacifismo absolute ne taŭgas. La sama eraro estus diri, ke unu el ili tute taŭgas. Tion neniu homo povus pruvi, aŭ konvinki eĉ nur duonon de la homaro pri ĝia taŭgeco. Sekve oni devas ĉiujn toleri, esperante, ke ilia kunagado fine atingos la relative pli pacan ŝtaton de la tero. La legantoj konfesos, ke tiu kompreno pli bone rilatas al la principo de relativeco. Estas ĉonata fakto, ke la fama reprezentanto de la ideo de relativeco s-o Einstein estas pacifisto. Eble li el niaj legantoj povos nin informi pri la opinio de la filozofo koncerne nian temon.

Tamen plena klareco pri nia problemo verŝajne ne estos atingata per aplikado de tro abstraktaj konceptoj: relativeco kaj absoluteco. Mia supra rimarko pri la militservo-rifuzantoj montras, kiamaniere oni devas diferencigi. Se ĉiuj homoj rifuzas iĝi militistoj, certe milito ne estos ebla. Sed ĉu oni povas konduki ĉiujn al tiu agado? Ĉu oni ilin povas tien konduki sole per la predikado de tiu certe logika ideo: se vi ĉiuj rifuzos, milito ne ekestos? La historio pravas, ke neniam la plej bela ilustrado de la plej bona celo sukcesis konduki la homaron al tiu celo. Ni memorigas pri la idealisma predikado de la hebreaĵ profetoj: transformu viajn glavojn al plugiloj kaj viajn lancojn al vimbertranĉiloj! Aŭ pri la kristana pradokumento: paco sur tero! Amu viajn malamikojn! La veraĵ kaŭzoj, kiuj instigas la plejparton de la homoj al agado, ne estas ideoj, konceptoj de belaj celoj; estas pli surteraj, pli materiaj, kiuj ĝis nun puŝas la mizeran homaron. Tial la supre karakterizitaj idealistoj ĉiam nur konvinkos la homojn similajn al ili mem. Tio estas laŭdinda, sed ne sufiĉa agadmaniero. Nia petrograda samideano apartenas al ili. Li ankaŭ pentras belan celan, sed ne diras kiamaniere

adapti tiun celan al la faktaj materiaj interesoj de homara plejmulto. Je tiu vidpunkto la realismaj marksanoj superas al li, ne postulante iniciaton el homa volo, sed nur el cirkonstancoj evoluintaj sen konscia kunagado de homoj. Nur se la cirkonstancoj jam estas, la homa konscio povas adaptiĝi al ili kaj ilin akceli. Ankaŭ granda nombro da pacifistoj bazigas siajn teoriojn pri forigo de milito sur la realaj faktoj. Ili serĉas en la materiaj homaj interesoj, en la ekonomia vivo fundamenton por stariĝi pacoj. Oni trovas tiun metodon ekzemple en du gravaj verkoj „La granda eraro“ de angla pacifisto Norman Angell kaj „La milito“ de la ruso Iwan Bloch. La tasko de aspirantoj paca sur tiu realisma bazo estas unue esplori ekzakte la materiajn kondiĉojn de homa kaj homara vivo. Ankaŭ la ideoj konstruigitaj sur tiu reala fundamento devas esti studataj kaj ekzamenataj, ĉu ili vere respondas al la diritaj materiaj bezonoj. Ĉar la vera bezono de homo kaj homaro certe ne estas morto sed vivo, klare, ke milito ne povas esti rigardata kiel rimedo por plenumi naturan, realan bezonon.

Ĉiu diskutado pri kaŭzo de militoj estonte devus eliri de tiu diferenco. La aŭtoro devas klare esprimi, ĉu li parolas pri celo aŭ pri vojo. Se li nur volas desegni bildon de estonta homara ŝtato, lia sola rimedo por atingi sian celon estas konvinki la tutan aŭ minimume duonon de la homaro. Tiu aŭtoro, kiu volas montri vojon, devas firme fiksi siajn proponojn en ekzakta reprezentado de fakta homa kaj homara strukturo. Tio estas biologia kaj sociologia tasko.

La verkantojn de la unua speco oni ne devas kontraŭbatali per argumentoj ĉerpitaj el la alia, kaj reciproke. Tiu plej bone solvos la problemon, kiu elirinte de realaj homaj kondiĉoj sekvos ilian verŝajnan evoluon ĝis la ideala celo, vera kaj eterna paco.

### Scienco.

#### Meteorologio.

Oni facile rekonas la gravecon de tiu ĉi juna scienca branĉo por la terkulturo kaj ŝipveturado. Depost kiam la metodoj de la radiotelegrafado pliboniĝis, oni utiligis la radiotelegrafadon en la servo de meteorologiaj anoncoj. Unu el la kondukantaj spiritoj de la meteorologio estas la norvega scienculo Bjerkness. Li laboras sur pure teoria vojo. Per celkonscia aplikado de la termodinamika kaj hidrodinamika leĝoj li pretendas antaŭdiri la veteron. Liaj deduktoj sajnse estis mirinde veraj. En Norvegujo oni konstruis kontrolstaciojn, kiuj ree pravigis lin. Multuloj kontraŭdiras, ke oni povas en la norda (apudpolusa) Norvegujo multe pli facile determini la movdirekton de la aerdeprenoj ekzemple en la ekvatora sudo. Tamen la sukceso de Bjerkness estas notinda rezultato de la meteorologio.

#### Etnografio.

La ekspedicio en Dagestanon.

La 4-an de decembro, dum la kunsido de historia-etnologia fakto de Tutrusa Scienca Asocio por Orientstudado (sidejo en Moskva) Prof. N. F. Jakovlev faris la raporton pri la scienca ekspedicio en Dagestanon (kaŭkazo) dum la somero de 1923-a jaro.

La tasko de la ekspedicio estis la studado de la lingvoj, parolataj de la loĝantaro, esplorado de arkeologiaj monumentoj de la lando kaj scienca observado pri familia vivo kaj sciencaj rilatoj inter la tributoj, loĝantaj en Dagestano.



La ekspedicio konstatas, ke islamo aperis en la regiono ne pli frue ol en 14-a jarcento, dum ĝis nun oni opiniis, ke tio okazis en 7—8-a jarcento. Islamon en la lando, laŭ la esploroj, antaŭpaŝis floranta kristana kulturo.

Ankaŭ la ekspedicio observis la ekziston en Dagestano de du, ĝis nun nekonitaj, idiomoj. Krom tio estas trovita antikva, tre valora en scienca rilato, surskribo, kies tralego estas komisiita al la akademiano Marr. Laborante je la deĉifro de la surskribo la akademiano Marr konkludas, ke la surskribo estas farita en la albana lingvo kaj pravas la apartenecon de la avara tributo al la prauloj de antikvaj albanoj, pri kiuj skribas ankoraŭ bizantaj aŭtoroj.

De Sonoa, Arhangelsk.

**Biologio.**

**Evoluado de la biologio.**

Eminenta hungara kuracisto D-o Benedikt resumas la evoluadon de la biologica scienco en la tagjurnalo „Pesti Kurir“, Budapest.

Pri novaj malsaneco, mortigiloj, genie elpensitaj venenogaso — pri kiuj li skribas — ni jam sufiĉe aŭdis. Sekve de la malsatigaj blokadoj dum la milito novaj specoj de malsatigaj malsaneco anonciĝis. Kuracistoj havis la okazon sufiĉe oftan por ekoni la teruran grupon kaj la ĝin sekvanter berberion (kolonia malsaneco, „dormo-malsaneco“). Nenla epoko estis pli taŭga por studadi la amasohipnoton kaj popolan psikon. Kontraŭ tiuj teruraj danĝeroj kuraĝe militas la kuracista scienco kaj dum la lastaj 4 jaroj precipe la amerikaj laboratorioj kaj institutoj partoprenis en fruktdonaj esploradoj. Jen deko el la jamaj rezultatoj:

1. Defenda inokulo kontraŭ fiŝo. Tio estas konkero de la milito higieno.
2. Nova perspektivo ĉe la doktrino pri la nutrado sur bazo de la teorio pri la vitaminoj.
3. Apliko de la Roentgen-radiado kontraŭ kancero.
4. La organo-terapio t. e. uzo de ekstraktaĵoj el ŝanĝigitaj organismo-partoj por kuracaj celoj.
5. Lizo de la kinino kontraŭ fiŝo (tuberkulozo).
6. Kuracado de ĉiamdaŭraj infektaj malsanoj per febron forestigaĵoj iloj.
7. Laŭgrada kuracado de la paralizo pere de malaria inokulo.
8. Nova tekniko de la sangotransigo.
9. Kuracado de la diabeto per insulino.
10. Antaŭa forigo de la kromo per jodo en certaj teritorioj.

**Tekniko.**

**Enkonduko de la normoj en la industrion.**

Ĉie ekstigas normokomisionoj, kiuj unuecigas la teknikajn desegnaĵojn per fikso de certaj normoj. La ĉefa principo estas unukolora desegno, moderna kaj simpla projekcio; oni ĉiam atentu ĉe la konstruado la praktikajn bezonojn de la konstruado. La transmaraj normokomisionoj normigis la labormetodojn, la eŭropaj komisionoj ĉefe la metodojn de konstruado. En Germanio la teknikaj lernejoj kaj fabrikoj nun ĝenerale enkondukas la normojn. Ĉe la granda uŝlo de la normiga (interŝanĝebleco de maŝinpartoj ktp.) oni ankaŭ devas noti ilian malutilon: la limigo de la individuado de la konstruika laboro.

En tiu ĉi vere internacia laboro oni tre sentas la mankon de tuja internacia kunlaboro pere de internacia lingvo. Multaj faktoj parolas pri tio, kio ne estas ĉi tie prilaktebla pro troa faka karaktero.

Jozefo Major, Oldenburg.

**Diversaĵoj.**

**Uragano sur Nigra kaj Azova maroj.**

Precipaj malfeliĉoj trafis lasttempe nian suferplenan mondparton: fortaj ventegoj kaj neordinaraj frostoj kaj neĝado en Mez- kaj Sud-Eŭropo, elbordigoj de l' riveroj Seine kaj Narova kaj la aliaj kaŭzas al la malfeliĉa loĝantaro, ankoraŭ ne restariginta post la teruraj militoj kaj skuiĝoj, pluajn damaĝojn kaj suferojn. Lastricevitaj gazetoj ankaŭ konigas pri la fortega uragano, okazinta en la fino de dec. en sud-orienta parto de la sovet-rusa respubliko.

Telegramoj de „Rosita“ sciigas, ke 24. ĝis 26. dec. sur Azova kaj Nigra maroj furiozis fortega ventego kaj uragano, unika dum lasta dudeko da jaroj. La uragano rezultigis grandajn damaĝojn, precipe en urboj Novorossijsk kaj Anapa, kie ĝi estis sentata plej forte. La vento estis tiom forta, ke ĝi dekaĵigis la vaporŝipojn, ĵetis unujn kontraŭ aliaj kaj pelis ilin en la maron. Multaj havenaj barkoj kaj trenŝipetoj pereis, la aliaj suferis avariojn. En la haveno de Novorossijsk estas tiom grandaj ruinigoj, ke kelktempe ĝi ne povos esti uzata por la eksportado de greno kaj terkarbo. Unika katastrofo okazis en la haveno de Anapa: la venpuŝo desurreligis eĉ vagonaron, konsistantan el 22 ŝarĝitaj per greno vagonoj, kaj renversis ĝin en la akvon. Kelkaj vaporŝipoj pereis, interalie ĉe Batum angla „Kopogias“, ŝarĝita per mangana minero, kaj la rusa „Inkerman“, ĵetita

sur la bordon. La aliaj, trafitaj surmare, pen-pene sukcesis atingi la plej proksimajn rifuĝejojn; ekzemple la „Vasilij Fomin“, elveturinta el Novorossijsk antaŭ la ventego, elpumpis sur la ondegojn 2000 pudojn da petrolo kaj nur dank' al tio sukcesis eniri Sebastopol'an havenon. Multaj ŝipoj, ne povinte kontraŭstari, estas pelitaj al Bulgarujo.

Ankaŭ el aliaj lokoj venis sciigoj pri la damaĝoj. En Primorsko-Ahtarskoje, kuŝanta ĉe la Azova maro, la ondegoj forlavis tutan kvartalon de domoj kaj pereigis multe da bruto kaj fiŝista havaĵo. En Vladikavkaz estas ruinigitaj du domoj, forŝiritaj multaj tegmentoj kaj difektita la kablaro de l' elektra lumigado. La urbo restis mallumigita.

L-on.

**Internacia sporto.**

**Pri oceanaj sportaj transveturoj.**

(Letero al ET.)

Pasintan someron okazis du provoj transiri la Atlantikon per malgrandaj sportaj velboatoj. Unu el ili estis entreprenita de franca tenisludisto Allain Gerbault, kiu efektivigis la vojaĝon unuope en malgranda 10-tuna (9 m longa) jahieto. Kvan-kam Gerbault atingis Amerikon, tamen lia vojaĝo ne estis tro sukcesa, kaj la kuraĝa sportisto multe suferis dumfoje. Elveturinte el Gibraltaro, Gerbault estis multe malhelpata de ventegoj. Unu el ili daŭris 26 tagojn. La ondegoj igis al la eta ŝipeto kelkajn damaĝojn; precipe grava estis perdo de la tuta akvoprovizo. Pro turmentiga soifo Gerbault svenis kaj du tagojn la ŝipeto restis ludilo de la alta maro. Pluvo savis la pereonton, kiu poste sukcesis renkonti unu el la pakboatoj, de kiu oni provis lin per ĉiuj necesaj. Post peniga 142-taga (!) veturo Gerbault fine atingis New-York'on. Al la intervjuistoj Gerbault deklaris ke celo de lia vojaĝo estis ne nur transiri la Atlantikon, sed fari ĉirkaŭmondan vojaĝon, kiun li esperas fini en la daŭro de 3 jaroj.

La alia transatlantika veturo estis efektiva de kelkaj aŭstrijaj sportvelistoj por speciala tiucele konstruita veljaĥto „Sowitagsoght 5“.

La legantaro de ET certe memoros notojn de H. J. en W. pri la lasta vojaĝo (n-oj 145 kaj 145) samkiel la informpeton de l' korespondinto pri la alveno de la bravaj velistoj.

De post tiam pasis kelkaj monatoj sed plua sorto de l' forvelintoj estas nekonata (almenaŭ por ET-legantoj).

La subskribinto, mem malnova sportvelisto, tre ŝatus aŭdi pluajn sciigojn pri ambaŭ marvojaĝoj, ĉu per la ŝatata ET, ĉu senpere, ricevante kompletajn sciigojn kaj ev. fotojn aŭ bildojn por rusa fakrevuo.

Aldone li sciigas la interesigantojn pri la projektita ĉirkaŭmonda vojaĝo, entreprenata de petersburga sportisto Prohorov kaj aliaj en motorboato de speciala konstruo. La vojaĝo celas provon pri la taŭgeco kaj stabileco de malgrandaj ŝipoj por longdistancaj altmaraj vojaĝoj kaj ekzameno de la petrolmotoroj de interna bruligado. Ĉu rusan-landaj s-anoj povas sciigi ET pri detaloj de l' entreprenata vojaĝo?

R. Lorentson.

Provizora adreso: Reval (Estonio), postkast 6.

**Kroniko.**

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

**Afriko.**

**Egiptujo.**

Port Said. La Esp.-propagando tie bone sukcesas. Jus „Internacia Esperantista Klubo“ estas fondita. Ĝi multe servos al gesamideanoj trapasantaj la Suez-kanalon. Prez. estas s-o Dem. G. Ioanides (antaŭe en Smyrna), vicprez. f-ino Nelly Plaktary, instruistino, sekr. s-o Basil Kounakis. F-ino Plaktary organizis kursojn en la urba greka lernejo. Vizitantoj estas akceptataj ĉe s-o M. Handras, strato Suez 55, Port Said.

**Ameriko.**

**Insulo Kurasao.**

Oni informas nin pri viva intereso pri Esperanto. Izolat' si midanoj tamen ne disponas pri necesaj lernolibroj.

**Gvatemalo.**

Mezamerikaj samideanoj sciigas al ni, ke tie laboradas ankoraŭ malnovaj samideanoj foje fame konataj per eldoro de propra gazeto mortinta „Centramerika Esperantisto“. Bedaŭrinde ni ne jam sukcesis starigi rilatojn rektajn.

**Azio.**

**Azerbajĝano.**

Nia movado progresas iom post iom speciale sekve de klopodoj de samideanoj en Baku.

**Palestino.**

Tel-Avivo. Hebrea esperantista grupo „Verda Stelo“ fondiĝis la 30 epr. 1921 sub la gvidado de la s-o M. Sapir kaj reorganizigis la 8 dec. 1923 kun intenco daŭrigi la disvastigon de Esp. inter la israelida loĝantaro. Leciono estis aranĝata dufoje en la semajno, en dimenĉo kaj merkredo je la 20 h. La membroj kunvenas ĉiusembe je la 15 h. en la l'geĵo de s-o M. Sapir, reh Alenbi Crifej hagermani.

**Persujo.**

Ankaŭ tie la esp. vivo plifortigas dank' al fervora laboro ĉefe de armenaj samideanoj kiel pravas al ni pluraj tre legindaj leteroj. Vigla korespondon-rilato kun tiu kaj la najbaraj landoj ŝajnas esti dezirinda.

**Nederlanda Hindujo.**

Esperantistoj troviĝas en pluraj lokoj. Estas precipe eŭropanoj kaj hinoj, sed ankaŭ kelkaj malajoj. Tre sentata estas la manko de lernolibroj en hina kaj malaja lingvoj.

**Eŭropo.**

**Bulgarujo.**

Varna. Funkcias du kursoj en la knaba kaj knabina gimnazioj, same du kursoj por geurbanoj komencantaj kaj kaj unu por progresintoj lunde kaj vendrede. La juna grupo „Ruĝa ventego“ ree komencos sian pacan labaron. La du grupoj enhavas preskaŭ 100 anojn. La adreso de grupo „Fratico“: Z. Mladenova, Debarska 18.

**Franclando.**

Paris. La francaj samideanoj kaj precipe la parizaj havis grandan perdon pro la morto de s-o Decourt. Prof. en la liceo Michelek, la 31 dec. Li estis malnova samideano, fondinto en 1907 de la Federacio de Centra-Ocidenta Francujo kaj de la grupo de Flèche. Lasttempe li helpis al la restarigo de la parisa regiono.

Strasbourg. En dec. okazis propaganda parolado de advokato Gérard sub la prez. de vicurbestro Oesinger, kiu akceptis la honoran prezidantecon de la grupo.

Etiage (Orientaj pireneoj). Jus fondigis esp-ista grupo; ni ŝuldas iun sukceson al la agemo de s-o Etienne Salvat. Adreso de la grupo: s-o E. Salvat, négociant, Avenue de la gare en Etiage.

Sainte Marie. S-o Remon Duran (Esp-isto, kiu veturas bicikle ĉiujn vendredojn 26 km por ĉeesti la perfektigan kurson) intencas baldaŭ starigi grupon. Adreso: s-o R. Duran, Sainte Marie.

Perpignan. La regiona kongreso, kiu okazis la 7 dec. en Perpignan, faris bonegan propagadon en la regiono; multaj ĵurnaloj perolis pri ĝi.

Novaj anoj ĉeestis la kursojn kaj la propagando ĉiam daŭrigas kun aktiveco.

La komitato de ago kaj propagando kunvenas ĉiunmonate kaj lernas la praktikajn propagandajn metodojn. „Amika Rondo“ — tiu juna arto kaj literatura societo kies fondintoj estas s-o Jean kaj René Lich, jam komencis la lernadon de esp-istaj kaj francaj propagandaj komedioj. R.L.

**Germanujo.**

Chemnitz. Same kiel ĉiujn jarojn tiel ankaŭ en la nura jaro la ĉi tiea esperantistaro festis en sia kunveno la 20 dec. la naskiĝtagon de nia majstro. Pro la proksima kristnasko brilis kristnaska arbo. La aktoro Richter-Anschütz, Chemnitz, kiu ludis en Nürnberg la titolan rolon en „Nathen la ŝagulo“, prezentis el ĝi la ringofabelon. La festo estis vizitata multnombro. E. K.

Gaggenau (Murg-valo). Ankaŭ ĉi tie nun okazas Esp. kursoj de 4.1. Partoprenas SAT-anoj el Gaggenau, Rotenfels kaj Ottenau, ĉeestis la unuan ĵoron 15 membroj, kiuj eble post propagando plimuligis. La kurso okazas ĉiusembe vespere de 16.50 h. ĝis la 18.50 h., ĉar instruisto Gersner el Ruental (apud Rasiadt) devas forveturi per la lasta vegonaro je la 19 h. la kursanoj kunvenas en la popolernejo aŭ en la manĝejo Wieland apud ĝi.

Nürnberg. La 19 dec. okazis en la salonego de la hotelo „Deutscher Hof“ la Vintra Festo de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth. Ĉar la partoprenantoj de 15 esp. kursoj estis invititaj, la salonego estis pleneja.

Sub la brilantaj kandeloj de granda bele ornamita ablo estis prezentataj kristnaskaj kantoj de la kartela horo kaj je la miro de ĉiuj aŭskultantoj en la Esperanto ankaŭ ĉarmaj kantoj de infana horo. La programo ankaŭ enhavis solo-kantojn, deklamojn, prezentadon de diversaj muzikaĵoj por fortepiano, violono kaj adviolono. Specialan aplaudon ricevis la aktoro de la teatraĵo „La paciento de l' kuracisto“ de J. B. Trenwith, trad. de John C. Scott. Post la salutparoloj de la kartelestro s-o Pilhofer sekvis la festparolado de s-o D-o Ledermann, pri Kristnasko kaj Esperantismo. En la finparoloj la kartelestro speciale dankis al la instruanto de la infanoj s-o Volkert de la Laborista Grupo kaj al la plezurestro de la kartelo s-o ĉefinstruisto Meyer, kiu dum semajnoj estis preparanta la feston.

Weinböhla. La 5 jan. okazis kristfesteto pri la ĉi tieaj 60 esp. infanoj. La infanoj kantis, deklamis kaj ludis teatraĵon en Esp. Ili ricevis kakaon kaj kristnaskan bak-aĵon. Amikoj de nia movado el la loko kaj el la ekstere lando helpis per donacoj al la plena sukceso de la aranĝaĵo. La vizito estis tre multnombra, la entuziasmo por Esperanto tre granda.

**Hungarujo.**

La hungara reĝa ministro por internaj aferoj malpemis la liveradon de „Sennacieca Revuo“ komunist-tendanca, esperantlingva en Paris aperadanta, kontraŭnacia, monata revuo, kies ekzempleroj devas esti konfiskataj kaj procedo farota kontraŭ la disvastigantoj. (Laŭ oficiala teksto.)

**La Zamenhof-Giesswein Festo en Budapeŝto.**

La 16 dec. okazis en la Socia Muzeo la memorfesto de Giesswein kaj Zamenhof. La sukceso estis bona, ĉeestis proksimume cent personoj, la ĉambrego estis plena, kelkaj gazetoj raportis. La vivojn kaj verkojn de Zamenhof kaj Giesswein klarigis kaj komparis D-o L. Löränd, poste la laborista kantistaro kantis la himnon kaj aliajn kantojn. D-o J. Takács laŭlegis la kondolencesprimojn de eksterlandaj societoj, D-o Kalocsay laŭlegis poemon je memoro de Giesswein, s-o B. Szász laŭlegis el verkoj de Giesswein kaj P. Balkányi hungaran poeman scenon pri esp-istoj, kiu laborante suferis pro la interna ideo atingas en la ĉielo la unuan lokon. Dum la festo oni kolektis por la tombomemoro de Zamenhof hkr. 85.000.— Al LIEA aliĝis 36 membroj.

Bonsukcesa Zamenhof festo estis ankaŭ en Szombathely.

P. B.

**Italujo.**

Udine. La 21 dec. en ĉambrego de la Popola Universitato de Udine f-ino Vanda Asquini (instruistino de la Instituto de Esperanto en Trieste) faris propagandan paroladon antaŭ kelkcento da aŭskultantoj. S-ano Johano Della Savia malfermos kurson la 16 jan., sub la aŭspicio de la Popola Universitato, kies prezidanto Prof. D-o Barono E. Morpurgo, multe simpatias kaj favoras nian movadon.

**Jugoslavio.**

Čaphina (Hercegovino). En tiu ĉi urbeo gvidas kurson por sinjoroj kaj unu kurson aparte por fraŭlinoj nia juna s-ano s-o Rafaelo Kralič.

**Litovio.**

Kaunas. 7 nov. en la Instruista Profesia Gimnazio por pleneĝaj lernantoj estas fakultative enkondukitaj Esperanto. Ekzistas 2 grupoj: en la unua 29, en la dua 34 lernantoj. Entute 63 kursanoj. Instruas studento de Litova Universitato Vladas Butkus.

En la Universitato ekzistas kaj laboras Studenia Esp. Societo. Ĝi ĉiudimane faras kunvenojn por perfektigado. 9 dec. rekomencas en Universiteto kurso de Esperanto, gvid. de s-o P. Medem. Enskribiĝis pli ol 50 studentoj. Ĉiutage kovnanaj esp-istoj kolektiĝas ĉe s-o P. Medem por plua perfektigado en Esp. Oni legas referatojn.



**Nederlando.**

Ha ag. 28 dec. okazis festospero de la Haga Esp. Grupo „Fine ĝi venkos“. S-o Kovacs belege kantis el ĵus eldonita Intern. Kantaro (kantoj de Schumann, Schubert ktp.) S-ino Isbrücker kaj s-o Dufrenne deklamis kaj s-ino Isbrücker montris ameson da belaj lumbildoj de la kongresurboj. Kelkaj novaj membroj kaj kursanoj sin enskribis. La festeto estis vera sukceso.

Kelkajn tagojn antaŭe s-ino Isbrücker, laŭ invito de la estraro de ĝejnula asocio „Praktika/Idealista Asocio“, klarigis antaŭ ĉ 200 ĉeestantoj la signifon kaj valoron de Esp., speciale atentiginte je la ideala flanko de la movado. La elokventa, konvinkiga parolado de s-ino Isbrücker havos sendube la dezirindan sukceson. N.B.

**Polujo.**

Bydgoszcz. En Pola Parlamento (Sejm) faris sejm-deputito A. Pankratz el Bydgoszcz duan interpelacion pri Esp.; la hazardo volis, ke ĝi koincidis kun la naskiĝtago de D-o Zemenhof, la 15.12.23. La interpelacio estis represita en multaj nacilingvaj ĵurnaloj, kaj kaŭzis, ke ree miloj da neesperantistoj legis ĵin pri Esp. La tradukoj de la interpelacio oni legu aliloke. La esp-istoj de Polujo ĝoju, ke ili havas tiel kuraĝan defendanton en la plej alta ŝtata korporacio legodonanta.

Lublin. La 13 dec. ni festis la naskotagon de Zamenhof Orkestro de Lublina Laborista Kooperativo ludis la himnon, kelkaj deklamis, aliaj kantis, preleĝon oni faris. La instruo de Esp. ĉe la „Kursoj por maturuloj de la Lublina Koop. Lab.“ daŭradas. — Krom tio oni kunvenadas ĉiusemajne sabato vespre.

Poznan. Inter ĉi tiea policistaro estas laŭ ordono de ĝia estraro (komparu la interjuvon en ET n-o 143 inter pola ministro Kiernik kaj Prof. Kronenberg) gvidata speciala Esp. kurso.

Rowne. Ĉi tie ĵus fondiĝis esp. grupo nomiganta „Antaŭen“; ĝia sekretario estas s-o I. Zilberstein.

Rozwadowo. Fervore propagandas kaj instruas sukcese Esp. inter ĉi tieaj inteligentuloj apotekisto s-o L. Sigall. P. E. S., Bydgoszcz.

**Portugalujo.**

La movado revigligas. Funkcias en Lisboa kurs-j ĉe Lisboa Verda Selo, Esperantista Rondo Amikeca, Faka Asocio de Komizoj kaj Portugala Polica Esp. Societo. La defnitiiva sidejo de Esperantista Rondo Amikeco, kies oficiala inatiguro baldaŭ okazos, estas: Rua da Fé, 25-1, ĉe Gremio Beirao.

La delegito de UEA, s-o Saldanha Carreira, faris paroladon pri Esp. ĉe Industria Lernejo Afonso Benevides, laŭ invito de la direktoro. Oni preparas kurson.

Estas vizitiina nun aŭstria esp-isto s-o Winkler el Wien.

**Rumanujo.**

Alba-Iulia (Transilvanio). La tiea esp-istaro la 22 dec. unufoje kunvenis en la nova kunveno, salono en kafejo „Europa“, decidis fondi grupon kaj malfermi kurson.

Bucuresti. Komitatunskido de Rumana Esp-ista Societo (RES), la 13 nov. decidis elektii por ekstera reprezentanto kiel vicprezidantojn s-ojn H. Fischer, L. K. kaj D-on Francisko Iosif; kiel ĝen. sek. s-on ing. I. Giuglea; kiel reprezentanton de la aligita landpartoj s-on majoron A. Hasenöhrl; kiel reprezentanton de UEA s-on ĉefdelegiton Andreo Ce kaj kiel sek.-kas. s-on Tiberio Morariu.

— La oficistaro de Esp. Centro Rumana pliĝis per s-ano D. Tejušan, esinta sekretario de la esp. grupo en Targul-Mureş (Transilvanio) kaj fervora kursgvidanto.

— La 19 dec. vizitis la Esp-istan Grupon kaj Klubon s-o inĝeniero Harold Jackson, angla semideano el Preston, oficiano nun ĉe la rumana petroleksploato.

Piatra-Neamtz. La 16 dec. fondiĝis „Societo Esperantista D-o L. Zamenhof“. Por honora prez. estis elektita s-o N. Alexandrescu Guranda, direktoro de la Banko Petrodava kaj prezidanto de la Komerca Ĉambro. Fervore agadas por propagando kaj organizo s-o J. M. Creizel.

**Rusujo.**

Kazanĵ (180000 loĝ.). La vundoj de la malsatara malfeliĉo fratpaj al esp. movado en Kazanĵ, komencas resaniĝi: denove ekfunkcias la kazana esp. societo, reorganiziita kiel filio de Sovetlanda Esp. Unuiĝo. Dum nov. okazis 5 lekcionoj pri Esp. en diversaj kluboj. Kursoj de komunista universitato por tataroj, en komunista universitato por rusoj, en klubo de naciaj malpilmuloj, en 5 klaso de duagrada lernejo (gimnazio) kaj du privataj grupoj. En kazana rusa kaj tataza gazetaro aperis de 1.8. ĝis 1.12.23. 9 tradukoj el esp. ĵurnaloj kaj 15 artikoloj kaj notoj pri Esp. — 25.11. la kazanaĵ esp-istoj aŭskultis la radio-koncerton aranĝitan de Moskva Esp. Klubo.

**Svisujo.**

Locarno. La esp. grupo estas organizata. Fabrik-direktoro s-o K. Giliĵ estas elektita prez. La grupo ricevis de la urbestro senpagan kunvenojn en la urboldomo.

La delegito de UEA s-o Stef. Pedrazzini varbis en Locarno kiel esp. entreprenon de UEA 6 firmaoj, inter ili la Kmercan Cambren, la Porfermulan Oficejon ktp. La del. de UEA kune kun s-o Giliĵ, vicprez. de la K.C., klopodas ĉe turismaj kaj komercaj rondoj. Stef. Pedrazzini alvokas al ĉiuj del. de UEA vorti en siaj urboj almenaŭ 3-4 esp. entreprenojn. Varbado de almenaŭ 800-1000 esp. entreprenoj certe akcelos la uzadon de Esp. en komercu kaj poste plifortigos UEA.

**La neceseco de Esperanto en Ned.-Hindujo.**

La rasoj kiuj troviĝas en Ned.-Hindujo estas diversaj. Precipe oni trovas ĥinajn kiuj estas eĉ reprezentataj. Migrinte jam multo da jaroj en ĉi tiu mondparto, mi konstatis ke la ĥinoj ĉie estas troveblaj. Sur Javo, Sumatro, Borneo aŭ Celebeso nenie ili forestas. Nek en grandaj, nek en malgrandaj urboj ili mankas. Estas vere, ke ili estas bonaj komercistoj, ĉar preskaŭ nenie ili manlaboras, sed preferas la komercon. La diversaj insulanoj aŭ indiĝenoj preskaŭ nenie havas butikojn nur malgrandajn vendejojn (warong). La ĥinoj havas la plej grandajn butikojn aŭ komercejojn. Kompreneble ili devas koni la komerc-lingvon, la malejan, por povi fariĝi komercisto kaj ili lernas tre rapide tion, kio al ili donas profiton. Per la maleja lingvo, oni preskaŭ ĉie povas interkompreniĝi, sed precipe inter la ĥinaj komercistoj. Strange estas ke multe da indiĝenoj eĉ ne konas la malejan, kvankam ĝi estas la Esperanto por Ned.-Hindujo. Multfoje mi klopodis paroli kun diversinsuloj, sed preskaŭ ĉiam ni bezonis la helpon de la ĥina komercisto. Ili scipovas nur la lingvon de sia landparto kaj tial la ĥinaj komercistoj estas la estroj en la

komercu, pro ilia estreco de la lingvoj. Ĉu estas logike aŭ ne, se mi parolas pri Esperanto, ke ili entuziasme elvokas: Mi volas lerni tiun ĉi lingvon? Tiam mi sentas ke la Esperanto-movado suferas je malsano. Mi tiam foriras ruĝiĝante, ĉar... kiamaniere mi povas havigi al ili ĥinan lernolibron?? Mi scias ke tiuj ekzistas... sed ne en Hindujo. Tial mi turnas min al la ninaj esperantistoj aŭ grupoj petante, ĉu ne estus eble trovi adresojn preferere en ĥinaj libroj por akiri esperantajojn? Per anonco en ĥina gazeto certe oni sukcesos. Se oni do serĉas rimedon por servi fidele kaj helpi konstrui esperantan mond-movadon, nu, tiam oni iniciatu la necesan. Kelkaj ĥinaj inteligentuloj jam bone konante Esperanton en Semarang, Grisiĉ ktp. certe estos pretaj fari lekcionojn aŭ aranĝi kursojn, sed la interkonatiĝo unue estas necesa. La samo valoras por turkoj, japanoj ktp. Se la grupoj klopodas pere de siaj ras-gazetoj anonci, ke lernolibroj por Esperanto estas aĉeteblaj je ia adreso, tiam la sukceso ne povos forresti.

J. T. Kaptein, Ned.-Hindujo.

La sugesto de s-o Kaptein estas tre atentinda. La samo cetere validas por aliaj landoj aziaj, la div. kolonioj, Siamo ktp. Ni turnos nin pri la afero al la gvidantaj samideanoj en Ĥinujo. Ni ĵus ankaŭ sciigis, ke komisiono de nederland-hindaj esperantistoj okupas sin nun pri la problemu de aperigo de lernolibro en maleja lingvo, jam verkita de fervora esperantisto ĝis antaŭ kelka tempo restinta en Hindujo s-o P. W. v. d. Broek, Leiden.

**La surdmutuloj kaj Esperanto.**

Por la XV-a la loka grupo de Koblenz alportis ĥiu akcelis la enkondukon de Esperanto en la surdmutulajn institutojn kaj lernejojn de la tuta mondo. Bedaŭrinde pro la multaj pli urĝaj proponoj ĝi ne povis esti konigata, sed oni konsilis, publikigi ĝin per la gazetaro. Jen la teksto:

„La Loka Esperanto-Grupo de Koblenz prezentas tiun ĉi rezolucion: Ĝi konsideras la aligon de la surdmutuloj al la Esp.-movado efika rimedo por plivastigi Esperanton, precipe ankaŭ inter la aŭdantaj gvidistoj kaj instruistoj de la surdmutuloj, kiuj ĝis nun forrestis. Plue per Esperanto al la kulturo-malriĉaj surdmutuloj, kiuj krom sia gestolingvo nesufiĉa por ia internacia interrilatado ne posedas sufiĉan internacian skriban esprimilon, oni donas okazon, pli multe partopreni la mond-kulturan bonajojn. Esperanto kiel lingvo internacia, ĥiu estas tiel parolata kiel skribata kaj tiel skribata kiel parolata, ĝuste pro tiu ĉi eco estas la bezonata lingvo por la surdmutula pliperfektigo.

Tial ni proponas: La Kongreso bonvolu akcepti rezolucion, aligi la surdmutulojn, same kiel pli frue la blindulojn, al la Esp.-movado kaj entrepreni la necesajn paŝojn ĉe la kompetentaj registaroj kaj organizacioj por akcepti Esperanton kiel instrufakon en la surdmutulaj lernejoj.“

Esperanto-Grupo de Koblenz  
Stroh L. Funken.

Laŭ la sekvanta oni nun komencas efektiviĝi la iniciataĵoj.

En la „Deutsche Reichszeitung, Bonn“ 21.12.23. ni legas pri parolado (en germana lingvo) „Surdmuta kaj surda“ de Prof. D-o Lange, la direktoro de la Bonn-a universitata oreklinikulo laŭ instigo de la Internacia Egaleca Surdmutula Konsilantaro „Amo kaj Helpo“, Bonn, en la aŭskultejo de lia klinikulo. Post la parolado, interprenito de D-o Rikardo Rung, membro de la Koblenz'a grupo, en la son-kaj gestolingvon, tri surdmutuloj, resp. surduloj estis prezentataj, nome Willi Hack, lignajista helpanto al Berlin, kaj du gefratoj Werwie el Bonn, kiuj okupas sin pri Esperanto, parte sen, parte kun helpo de la Esp.-instruisto Glosmann. La tri suferkunuloj parolis Esperanton kaj skribis ĝin bele kaj klare sur la murtabulon, je la mirego de la ĉeestanta Prof. Lange, liaj asistantoj kaj ĉiuj ceteraj partoprenantoj. La bona sukceso pravas, ke ekzistas la rajtigita espero, ke la surdmutuloj solvos la problemon de la akiro kaj uzado de fremda lingvo, ke ili eĉ estos farataj Esp.-instruistoj por la surdmutuloj per la gesta lingvo.

(Ni havas intereson, ekscii ĉu ankaŭ aliloke surdmutuloj studas Esperanton. Sciigojn bonvolu adresi: Esperanto-Grupo, Florinsmarkt 7-a I, Koblenz, Germanujo.)

**POR LA FAKRUBRIKOJ**  
de nia gazeto  
**NIDAŬRE BEZONAS**  
ĉiam aktuelan  
**MATERIALON!**  
Sendu ĝin tuj al la redakcio de ET, Horrem b.Köln.

**Al la hodiaŭa numero estas aldonita la januara „Revuo“.**

**Maria Reĝino de Rumanujo permesis traduki siajn verkojn en Esperanton.**

Ŝia Moŝto Maria, reĝino de Rumanujo, konata ankaŭ kiel aŭtoro de rimarkindaj verkoj beletristikaj, donis permeson al Rumanda Esperantista Societo, por traduki siajn verkojn en Esperanton.

**Ĉeĥoslovaka esperanta instituto,**

fondita la 27.6.1923, aprobita per dekr. de ministerio por internaj aferoj en Praha II, Křemencová 17, Telefono n-o 6977. Ĉs. poŝteka kornia n-o 55554.

**Raporto pri la pli atentindaj faroj de C. E. I. ĝis 31.12.1923.**

Korespondad-numeroj: 290 (kun prop. presaĵoj: 1255). Generala konstituiĝanta kunveno okazis 11.9., komitatataj 25.10., 20.12.

Sciigo pri konstituiĝo de ĈEI, sendita al 107 centraj ŝtataj oficejoj, komercaj ĉambroj, industriaj, turismaj kaj kulturaj institucioj, kaŭzis multe da favoraj respondoj poresperantaj.

Evidentiĝo de ministeriaj dekretoj priesperantaj. Intervenjo poresperantaj ĉe ministerioj por instruado kaj internaj aferoj kaj bohema landestrejo.

20.9. malfermitaj 3 kursoj por 49 komencantoj; instruis s-oj Eisel, Pitlik.

Partopreno je ekspozicio en Pĥerov (esper.) Praha (turisma), oficiala konferenco pri ĉs. turisma movado kaj ĉeĥogermana amika kunveno en Ĉ. Lipo (B. Leipa). Agiata ĉe hotelestroj koncerne la rabatigon al vojaĝantaj esperantistoj kaj enskribon en la adresaron de la esp. renkontejoj. Poresperanta propagando en kelneraj organizacioj. — Regula priesp. rubriko de ĈEI en gazeto „Studenta turismo“, anoncoj en horaro de „Ĉedok“ kaj artikolo en „Turista kalendaro“ 1924. — Komunikoj al la ĉeĥa gazetaro pri esp. novaĵoj. — Multe da informoj pri- kaj peresp. —

Daŭrigata varbado de novaj membroj al UEA (ĝis nun 14). —

La membroj aŭskultis radiotel. paroladojn de Merchant, Fairbairn, Dresden en militista radiostacio „Petřin“, kiun oni permesis al ili trarigardi la 26. X. —

La Instituton vizitis: s-oj Applebaum (Liverpool), Gerstner (Karlsruhe), Häfker (Dresden), Charles (Paris), Rousse (Avignon). —

Programo, efektiviĝota en la venonta kvaronjaro: 1. (Malfermo) 9. 1. (de legejo kaj reprezenta klubejo de ĈEI en Mikulanská 7, l.etĝ: (palaco Nostij), kunvenoĝi ĉiumerkrede je la 8 v. — 2. (Malfermo) 24. 1. de la „Privata esperanta lernejo de ĈEI, aprobita per instruad-admin. dekreto 131488 7, XII. 23., kiun estros lingva sekcio de ĈEI (Cánský, Eisel, Pitlik, Procházka, Šupichová) prezidata de lernejestro s-o Eisel. — Morala subteno al propono de Prof. Fridriĉ pri internacigo de ĉs. studentaj turist. نکتهtoj, alirebligotaj al esperantistoj vojaĝanta junularo. — Radiotel. peresp. parolado de s-o Pitlik pri ĉs. turismaj atrakcioj (31. 1. je la 7.50 v. ĉi Kbely 1150 m, 1 kw.) — Pretigo de lumbilda pruntedonata parolado priesp. — Esperanto-tago (29. III.) dum la printempa foiro en Praha kun foirdona ekspozicio kaj komercesp. propagando. —

**Universala Esp.-Asocio Junulara kaj „Esperantista Junularo“.**

Komence de 1920 aperigis la instruisto A. Robin (Baugé, Francujo) la unuan (hektografitan) num. de „Esperantista Junularo“ kaj fondis UEAJ por koncentrigi la ĝejnularajn fortojn. En jan. 1921 Eĵ estis presata gazeto (dumonata). En sept. 1922 ĝi jam aperis 8 paĝa. Grandajn sukcesojn alportis la jaro 1923. La unua jarlibro de UEAJ aperis en aprilo. Kvankam nur 40 paĝa, ĝi estas grava informilo por ĉiuj UEAJ-ano. Depost jun. 1923 Eĵ estas redaktata de grupo da edukistoj, jam laborantaj en „Novaj Tempoj“ (Revuo por popololedukado kaj homara kulturo) kaj estas presata en Leipzig. En la Nürnbergaga kongreso okazis la unua fakkunsido de UEAJ, kaj la tiumonda Esp.-instruistaro rekomendis en Nürnberg la gazeton Eĵ por junuloj kaj instruistoj. La legataro de Eĵ konstante kreskis, kaj pro tio ni esperas, ke en 1924 Eĵ aperos 8 foje (anstataŭ 6 foje en 1923), kaj „dika“ jarlibro estos eldonata. La jarabono nun estas la kvaroblo de literafranko al eksterlando. La komenco de la statutoj montru celon kaj organizadon:

§ 1. UEAJ celas: 1. antaŭenigi la Esperantomovadon inter la tiumonda ĝejnularo per koncentriĝo de ĵunuloj kaj porĵunulaj fortoj, 2. precipe servi al la Esp-ista Junularo ne farante diferencojn inter raso, nacieco, religio aŭ lingvo, 3. kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolviĝi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.

§ 2. UEAJ servas per: 1. lokaj aŭ distrikaj delegitoj, 2. ĉefdelegitoj, 3. la 7 membra komitato, el ĥiu formiĝas jenaj komisionoj:



- a) Centra Oficejo de UEA,
- b) Redakto de EJ,
- c) Esp. Junula Librejo kaj Biblioteko,
- d) Bonfara Komisiono (por vojaĝantoj, malfortuloj, malsanuloj, mizeruloj ktp.).

Tutmonda junularo kaj junula amikaro, kunlaboru, alĝu, helpu!  
UEAJ kaj EJ helpas konstrui firman fundamenton por la mondregno Esperantujo.

### Libera tribuno.

Sub ĉiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen en prenas sur sin un respondecito pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neŝatigajn artikolojn.

252. Ril. al 250 kaj 240.

Kiam mi sukcese proponis en n-ro 58 de ET la mallongigon s-o por s-ro, mi absolute ne pensis al la cetere tute prava teoria rezonado de s-o Karl Minor pri parolaj kaj gramatikaj silaboj. Mallongigoj, uzataj por celoj praktikaj, estu mallongaj kaj antaŭ ĉio facile kompreneblaj, kion ankaŭ tute prave substreksis s-o Teo Jung en sia parolo sub n-ro 240. Same opiniis s-o K. Loy, respondante al mia ĉi-koncerna demando en „Esperanto Praktika“ (n-oj 7-8, 1922). Tamen mi ne konsentas al la konkluda finparolo de s-o Minor, konsilanta, „se oni volos mallongigi sinjoro, sinjorino, numero, doktoro ktp., oni prenu la un u a n literon kaj la lastan silabon de la vorto. Sekve oni mallongigu s-ro, d-ro, s-ino, n-ro, ktp.“, do laŭ tio ankaŭ r-ro = redaktoro, r-cio = redakcio, f-ino, por la ofte uzataj vortoj kiel sinjoro = s-o, numero = n-o. Esperanto = E-o, Esperantisto(in)o = E-ist(in)o, doktoro = d-o, delegito = del-o, redaktoro = red-o, redakcio = red-it-o, direktoro = dir-o, direkto = dir-it-o, profesoro = prof-o. La mallongigoj ne estas difinitivaj, ĉiokaze eblas ĉiujn laŭ supra formo, mi direktiĝis per logiko kaj mallongeco, sufiĉanta por tuj facile kompreni la vorton. Dezirinde estas, ke la Akademio starigu baldaŭ sisteman liston de mallongigoj.

Fr. Prengel, Bydgoszcz.

255. Ril. al 213 kaj 251.

Sajnas al mi, ke s-o Dreher estas prava: la vorteto „ajn“ estas aldonata ne al la *demandaj* vortoj *kiu, kia* ktp. (ĉi 50 de „Ezkeraro“), sed al la samnomaj *rilataj* vortoj: *kiu, kia* ktp. Pruvo: 1. la *demandaj* vortoj *kiu, kia* ktp. entenas en si ideon pri io nedifinita kaj pri *neceso ĝin difini*; kontraŭe la vorteto *ajn* entenas ideon pri io sendiferenca kaj, sekve, ĝia aldonado al la *demandaj* vortoj *kiu, kia* ktp. entenas ideon pri io difinita kaj aldonante al ĝi la sendiferencan ideon, entenan en la vorteto *ajn*, ni nur ĝeneraligas aŭ plivastigas la unuan difinitan ideon.

Guste tiel kaj laŭ la samaj konsideroj ni povas aldoni a vorteton *ajn* al la nedifinitaj vortoj *ĉi, ĉia* ktp. Ekzemplo: „ili deziras, ke ni faru *ajn* decidon“ (parolado de D-o L. Zamenhof dum unua ĝenerala kunveno (7. VIII.) de la Unua Universala Kongreso 1905 en Boulogne-sur-mer), kaj al la ĝeneraligaj vortoj *ĉiu, ĉia* ktp.: la entenataj en ili ideoj pro tio nur plivastigas aŭ ĝeneraligas. Sed neniel ni povas aldoni la vorteton *ajn* al la vortoj *neniu, nenio* ktp.; la entenan en la lastaj vortoj nea ideo estas ideo tute preciza, tute ekskluziva kaj neniel ĝi povas esti plivastigata, sendiferencigata ktp.

Formi vortojn *ajna, ajnulo* k.s., sen ĵaj duboj ni ne havas rajton, ĉar la vorteto *ajn* ne havas memstaran signifon kaj estas nur ĝeneraliganta sendifina partikulo, aldonata al la supre montritaj vortoj; menciare ĝi ne povas esti uzata kiel en sia primitiva, tiel ankaŭ en la ŝanĝita formo. A. P. Andrejev, Tiflis.

### Radiotelefona prezentado per Esp.

La 51 jan. 1924 (horo ĝis nun ne difinita) el la Bourne-mouth-a Radio Stacio oni dissendos du kanton kaj mallongan paroladon esperantlingve. Ĉiuj samideanoj, kiuj bone aŭdas kaj komprenas, estas petataj skribi sciigante tion al „The Station Director, 72, Holdenhurst Road, Bourne-mouth, Hants, Sud-Anglujo. La voksignalo estas 6 B. M., kaj la ondlongeco 385 metroj.

Unue kantistino kantas esperante kaj tuj poste la saman kanton angle. Sekvos mallonga parolado angle per Esp. Dum ĉi tiu parolado mi salutas la eksterlandajn samideanojn en Esp. Poste oni kantas alian kanton esp. kaj angle. La du kantoj estas titolitaj „Dormu, ruĝa suno“ kaj „Mia kamarado“. La tute prezentado daŭros ĉirkaŭ duonhoron. La horon de la prezentado mi ankoraŭ sciigos.

H. Stay, „La Nia“, Southbourne, Hants, Heatherley Rd., Anglujo.

**Meyer's Handlexikon**

oka eldono, komplete re-  
prilaborita kaj plimultigita

75 000 gvid-vortoj kaj referencoj kun 2000  
ilustraĵoj sur 1632 pĝ. da teksto, 7 kolor-  
itaj, 46 nigraj tabeloj kaj tabel-listoj, 8  
koloritaj kaj 37 nigraj landkartoj, 24 re-  
—:—: sumaj tekstoj kaj statistikoj —:—:—

unu volumo  
tole bindita mk. 13.— × ŝlosiln.  
ekstierl. sv. fr. 13.—  
duontole bind. mk. 18.— × ŝlosiln.

Eldonejo de  
Bibliographisches Institut  
Leipzig.

„La internacia  
poŝtradukisto“

Gvidilo kaj vortaro en 11 lingvoj  
kun parto en Esperanto.

Por ĉiu poŝtisto.  
Por ĉiu komercisto.  
Por ĉiu korespondemulo.

Prezo nur 1.50 sv. fr. + afranko.

Skribu tuj al Eldonejo de  
„Esperanto Triumfonta“  
Horrem b. Köln.

Jus estas presata

**Eŭropo ĉe la abismo**  
de  
**Francesco Nitti**  
iama ministrara prezidanto itala

**Esperanto-traduko**  
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★

Peŭ prosektoj kaj detalojn kaj  
sendu antaŭmendojn  
je favorprezo al

**Frankf. Societät-Druckerei G. m. b. H.,  
Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.**

Korespondeo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

**Prezo-redukto!**  
Favorprezoj por libroj.

**Taglibro de vilaĝpedelo  
Malriĉa en spirito.**

Ĉiu libro kostas provizore nur 0.60 sv. fr. aŭ  
0.50 or-mk. inkluzive sendkostoj. Skribu tuj al

**Butin & Jung, G. m. b. H.**  
Godesberg (Germ.) Bahnhofstr. 30.

**Mia amiko**, internacia legolibro kun verkoj de  
Zamenhof, Bourlet, Selma Lagerlöf, Sigema-  
cnu, Ramstedt, Rabindranat Tagore, K. Bein,  
Gogol, Abdul Baha ktp.

**Guto post guto**, kolekto de plej belaj origi-  
nalaj versajtoj de esp. poezio: verkoj de  
Zamenhof, Hankel, Franz, Simeonov, Privat,  
Soloviev, Schulhof, Doleys, Nekrasov, Kaus,  
Silvestriev, Georg Deŝkin, Kühne ktp.

**Ĥinago**, rakonto de Jack London, kun aŭtoro  
permeso trad. el angla lingvo P. Kalisky-Kay.

**Blanka cigno**, poemo de K. Balmont, trad.  
el rusa lingvo de N. Nekrasov.

**Dek** diversaj esp. ilustritaj poŝtkartoj.

Sen P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2

Ĉiu por  
nur  
2  
svisaj  
frankoj  
al-  
egal-  
valoro

Fach 18  
Germ.

**Malaltigo de prezoj.**

Por akceli la disvastigon de niaj bon-  
sitaj libroj ni fiksas ĝisplue  
prefer-prezojn.

Bukedo, 1. volumo	0.60 sv. fr. aŭ
Malriĉa en spirito	0.50 ormarkoj
Bialystok	0.50 sv. fr. aŭ
Albanio	0.25 ormarkoj

inkluzive sendkostoj.

Utiligu la favoran okazon! — Mendu tuj ĉe

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“  
Horrem b. Köln (Germanujo).

# Varbu!

**Anoncetoj.**

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĝigo, edziĝo, morto, okaz-  
ontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.  
Aliaj anoncetoj, nur akcepteblaj por minimume du sinsekvaj enpresoj,  
kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de  
ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Anoncetoj, kiuj ni preferas de-  
preni la pagon de abonkoto, ĝuas per propra anonceto preferan  
prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk. provata prezo  
por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ  
publikigo.

NASKIĜO. Al samideano I. Kovalevski kaj edzino Stani-  
slawa en Taŝkent (Turkestano) naskiĝis filino nomita Zofio.  
(Ni gratulas! — Red.) [1]

TUTMONDAJ ANARKISTOJ! Ni organizu fakan kunvenon  
dum la kongreso de Wien. Skribu al: Dimitri Zlatarski,  
Trakjijska 24, Varna, Bulgarujo. [2]

FARMACISTOJ! Tuj ni eldonos la gazeton „Farmacio  
kaj Hemio“. Bonvolu sendi al ni viajn manuskriptojn.  
Speciale junaj farmaciaj studentoj de la tuta mondo  
helpu nin! Jarabono 4 respondkuponojn. Esp. grupo  
en Tojama, farmacia kolegio, (reprezentanto s-o Tsune-  
shigo Matsumoto), Tojama, Japanujo. Ni korespondas  
pri ĉiuj temoj kun ĉiu samideano. [1]

„La kvinjaro de Sovetlandoj“—luka albomlibro pri Kvin-  
jara ekzistado de la Sovetaj Respublikoj. 80-paĝa, 70  
ilustraĵoj. Trad. V. Polakov, Ĉetebela ĉe Centra Komitato  
de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (Moskva-Ruŝujo, PK,  
No. 650). Prezo por malbonval. 1 sv. fr., meval. 2  
sv. fr., bonval. 3 sv. frk. Por afranko oni aldonu 10%.  
La libro estas sendata post antaŭpago per monbiletoj  
stabilvalutaj en rekomenditaj landoj. [3]

HELPU NIN, gesamideanoj tutmonde! Por ke ni povu  
sukcesplene aranĝi ekspozicion propagandan kaj por ke  
ni povu ornamti nian novan klubojn, ni petas ĉiujn el-  
donejojn, redakciojn, grupojn kaj apartajn esperantistojn  
sendu al ni kiajn ajn esperantaĵojn. Koran antaŭdankon.  
Esperanto-grupo, s-o D. Tuĝarov, Ferdinand 26, T-Pazar-  
ĝik, Bulgarujo. [1]

**Korespondeo kaj Interŝanĝo.**  
S-o Debarbieri Guglielmo, via Casaregis 55, Genova, Ital.,  
deziras interŝanĝi pm. kaj pk. kun gesamideanoj de la  
tuta mondo. Mi preferas Svislandon, Nederlandon, Bul-  
garujon, Grand-Britujon, Danujon, Norveĝujon, Svedujon  
kaj Afrikon. [2]

Korespondemuloj! Germana junulo deziras interŝanĝi  
kun gejunuloj de eksterlando, precipe kun inoj. August  
Spürkel, Horrem b. Köln, Hindenburgstr. 22, Germ. [2]

S-o Erich Hums, oficejo, Köfnerstr. 11, Oelsnitz, Vogl.,  
Germ., deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi  
donas bonajn pm. Respondas tuj. [4]

S-o Johano Kratochvill, instruisto, Sereb, Bratislavskaja  
zupa, Ĉeĥosl., deziras interŝanĝi pm. kun Svedujo, Nor-  
veĝujo, Irlando, Partiguĝio, Soveta Ruŝujo, Bulgarujo,  
Jugoslavio, Saarteritorio, Danzig, Memel, Supera Silezio,  
kun ĉiuj eksterŝtataj landoj. Ĉiam respondos. [2]

New Orleans! Mi deziras korespondi kun esp-istoj en  
New Orleans. Adreso: S-o J. B. E. de Kosier, 98, Dalton-  
straat, den Haag, Nederlando. [2]

Por propagando de Esperanto deziras interŝanĝi pm. kun  
japanoj, ĥinoj, aŭstralaj, finlandanoj, portugalaj, litovaj,  
latvoj, jugoslavoj kaj svedoj. S-ano Szec, del. UEA,  
ul. Warszawska 12, Radom kaj s-ano W. Kiak, poŝtisto,  
Radom, Polujo. [1]

Frato kaj fratino deziras korespondi kun la tuta mondo  
per l. pk., l. kaj interŝanĝas pm. F-ino Theresia Schwartz  
kaj F-ino Ing. Otto Schwartz, Aussig (Elbe), Teplitz-  
26, Ĉeĥosl. Ĉiam respondos. [2]

S-o C. N. Lou, sekretario de ĥina vicambasadoro en  
Roma, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Adreso:  
Via Nomentana 118. [2]

S-o Semmi Hautamäki, Vaasa, Rautakatu 26, Finlando,  
deziras korespondi per l. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. [2]

Esp.-ĝenerantajo de Rauma, deziras korespondi per l. pk.  
kun la tuta mondo. Skribu unue al F-ino Elli Väätäinen,  
Työväenosaustie, Rauma, Finlando. [2]

Pastroj atentu! Pastroj A. J. Ashley, The Vicarage, Far-  
ley Tyas apud Huddersfield, Anglujo, deziras interŝanĝi  
kun pastroj de ĉiuj landoj kaj komunumoj. [1]

Hans Dahmen, instruisto, Horrem b. Köln, Germ., deziras  
korespondadon per l. kaj interŝanĝas pk. il. (bfl.). Ne  
kolektas markojn. [1]

F-ino Jolano Steiner, studentino, Pécs, Légeszesgyar-u. 5,  
Hungarujo, deziras korespondi pri filozofio, literaturo nur  
kun studentoj. [1]

S-o Viktoro Balazs, dentkuracisto, deziras korespondi kun  
la tuta mondo. Adreso: Pécs, Rakoczy 35, Hung. [1]

Por 1 dolaro mi donas 50—100 pm. (ne- kaj stampitaĵoj).  
Registritu vian sendaĵon. S-o Hans Wolffschmitt, München,  
Klenzstr. 99. l. [1]

Fraŭlo Miguel E. Castaneda, str. Belgrano 825, Buenos  
Aires, R. A., deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiuj-  
landaj per l. il. pk. (bfl.). pri nacia vivo kaj iuj aliaj  
temoj, interŝanĝi intern. revuojn, naciajn kaj esp. Mi  
ĉiam respondos. [1]

S-o Szymon Rubinstein, Lubelska 25, Radom, Polujo, inter-  
ŝanĝas pm., papermonojn. Mi havas malnovajn pm. de  
Polujo. [1]

Grupo de metalistoj kaj petrolmineistoj volas korespondi  
per l. kaj il. pk. Ni respondas al ĉiuj. S-o B. Cechowski,  
Borislaw, Polujo. [1]

Filatelistoj! Por 5 sv. fr. aŭ egalvaloro mi sendas 50 div.  
pm. de 1 miliono ĝis 50 miliardoj kaj 10 verajn malotaj-  
aĵojn, por 4 sv. fr. 10 malnovajn pm. el jaro 1870. Ankaŭ  
interŝanĝas pm., sed nur malnovajn kaj malofitajn. S-o  
Otto Dietrich, Filrstenau 50, Post Lauenstein (Sa.) Germ. [1]

F-ino Rut Holmberg, Vestra Kattarj, Malmö 7, Svedujo,  
bedaŭras, ke ŝi ne povas respondi al ĉiuj, kaŭze de la  
amasa da Mässhack, rue Julius De Geyter 65, Antwerpen.  
Belgujo, deziras korespondi per l. kaj il. pk. kun ge-sanoj  
de la tuta mondo. [1]

S-o Anatolj Zdanĉko, Studencka 5, Nieswicz, Polujo, deziras  
interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [1]

S-o Stefano Janis, ledfabrika magazeno, Nové-Zamky,  
ledfabriko, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun led-  
fabrikaj laboristoj de la tuta mondo. [1]

S-o Tsuneshigo Matsumoto, ĉe Tojama Farmacia Kolegio,  
Tojama, Japanujo, deziras interŝanĝi l. pk. il., gazetojn,  
fotografajojn, esperantaĵojn, fungojn, desegnaĵojn de  
geknaboj kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Hans Stallinger, stud., „Hotel Elektra“ en Zell am See  
(Aŭstrio) kaj 15 ĝekursanoj deziras korespondi per l. pk.  
(bfl.) kaj l. kun ĉiuj landoj. Respondas almenaŭ unu-  
foje. [1]

Filatelistoj! Por 2 sviz. fr. aŭ egala valoro mi sendas 50  
div. malofitajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Inter-  
ŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz i. Vogt., Bergstr. 5. [5]

Fotografajojn pri Esperantistoj kaj famuloj kolektas s-o  
Aleksandro Vador, Bucaresti, Romanujo, Informejo  
Cinema Select, Calea Victoriei 48. Rekompenças per  
poŝtmarkoj aŭ poŝtkartoj laŭdeziro. [1]